


POR KE ĈIUJ ESTU UNU POR KE ĈIUJ ESTU UNU  
UT UNUM SINT UNUM SINT



(Joh. 17,21)



# ESPERO KATOLIKA

*monata revuo fondita en jaro 1903 — oficiala organo de I.K.U.E.*

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

# internacia katolika unuigo esperantista

fondita en 1910

honora prezidanto: pastro A. Beckers

---

## **Centra Oficejo**

CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch  
Svislando

## **Prezidanto:**

Pastro D. F. Longoni  
I-20051 Limbiate (Mi)  
Italujo

## **Kasisto**

Paul Scherer - Graber  
CH-6020 Erlenstr. 58  
Emmenbrücke (LU)  
Svislando

~~SEWAKWIK~~ Provizora sekretario  
Franco Galbusera  
Vicolo Ghiacciaia 6  
VERONA (Italio)  
P. K. 28/14016

## **Estraranoj:**

A. Berka - Ĉeĥoslovakio  
W. Mudrak - Aŭstrujo  
P. M. Casanoves - Hispanujo  
P. L. Kis - Jugoslavio  
P. W. Flammer - Svislando  
K. Van Kleef - Nederlando  
N. W. Vigar - Anglujo  
M. Švaček - Ĉeĥoslovakio  
D-ro K. Perko - Aŭstrujo

## **Oficiala Revuo**

Espero Katolika  
(Fondita en 1903)

## **Redaktoro:**

P. Felice Ruaro  
37010 Costermano (Vr)  
Italujo

## **Abonkotizo**

sFr. 14,=

---

# *Sinjoro, ke mi povu vidi!*

Se la Sinjoro donas lumon al miaj okuloj, mi klare povas vidi la kialon de multaj aferoj, ŝajne absurdaj. La fido profunde enpenetrigas min en Dion, kaj mia tuta ago iĝas luma.

Hodiaŭ la homoj kredas nur kion ili vidas, kion ili tuŝas. Ĉar kontraste kun la fida mondo postulanta purajn kaj sanajn okulojn, staras nia sensa mondo materia kun siaj maksimumoj, siaj postuloj, sia scio. Scio, kiu krias, ĉiutone, ke necesas disponi multan monon, daŭre progresi en la kariero, rapidege, sen skrupuloj, kaj... ĝui la belan vivon.

Se ni fiksas la rigardon en Dio, kaj poste ni turnas la atenton al medioj en kiuj ni vivas, tuj ni rimarkas, ke nepre ni bezonus tute aliformigi multajn aferojn.

Sinjoro, ke mi povu vidi!

La krio de la evangelia blindulo devas iĝi «mia ĉiutaga krio», arda je deziro kaj espero.

La fido prilumas ĉion, ekvidigas la postsignon de la Dia ĉeestado en ĉiu homo, la Dian imagon en ĉiu frato...

La vojo de la simbolo de nia fido, admiriginte al mi la vizaĝon de Dio Patro, Filo kaj Sankta Spirito, trovas sian ĝustan elirejon en la Eklezio, la plej taŭga, privilegia sidejo de tiu amo-ĉeesto en la mondo.

Sinjoro, ke mi povu vidi!

En ĉiu tempo kaj por ĉiu homo devas esti ebligata la sperto de ĉi «eksplodo» de la Dia Amo.

De Lubac en sia verbo «La Eklezia vizaĝo» asertas ke ni kredas ne «en» la Eklezio, sed «la Eklezion», ĉar ĝi ekzistas ne por si mem, sed por Dio. Ni kredas sole je Dio, sed estas en la Eklezio, ke ĉi tiu fido fariĝas aŭtentika kaj tute certa.

Ni ne povas kredi je ĝi kiel Aŭtoro de nia savo, sed ni firme kredas, ke ĝi estas la Patrino portante al ni la rekreon kaj la savon.

Ni estas alvokataj partopreni en la Eklezio ĝuste por esprimi ĉi daŭran fidon, kiun el la tero, dank'al Kristo kaj helpe de la Sankta Spirito, ni senĉese levas al Dio, nia Patro.

Sinjoro, ke mi povu vidi!

Jes, ĉar kredi «la Eklezion» multfoje kuntrenas malfacilaĵojn kaj tiom multe da sufero por la respondeculoj interne de ĝi, kiam ili devas, respondece, decidi laŭ ĉiu historia vojokurbiĝo, ĉiu praktika neceso.

Se nia fido dum ĉi momentoj febliĝas ĝis preskaŭ forestingiĝi, tio, ja, signifas ke ni tro longe restadis ĉe la ekstera vesto de la Eklezio, ke ni tro haltis ĉe ĝia homa aspekto kaj ne sciis ekvidi ĝian misteran kaj supernaturan realecon; realeco kredenda kaj akceptenda en la senlumo kaj en la silento kiu devas profunde eniĝi en nian vivon kiel Dia invito, alvoko kaj sugesto.

Kiu ne vidas la Eklezion, certe ne povas malkovri la senĉesan agon, kiun la Sankta Spirito, animo de la Eklezio, daŭre plivastigas en ĉiu el ni kaj ankaŭ, samtempe, en ĝi por ĝin igi pli kaj pli perfekte pura kaj sankta, sen sulko, sen makulo.

Sinjoro, ke mi povu vidi!

Oni petas al ĉiu kristano, ke li estu en la mondo Eklezio-atesto ĉiam pli klara kaj travidebla, tiel ke la homaro ame akceptu la planon de savo de Dio Patro, kiu «tiel multe amis la mondon, ke li sendis por ĝi Sian Solenaskitan Filon».

Ju pli mi vere kredas kaj vivas ĉi tiun realecon, des pli mi vibre malfermiĝas al la Dia Amo, iĝante viva ĉeesto por la fratoj kun mi travivantaj la komunan, homan aventuron.

R. FORNARI *Esperantigis Norma Dell'Aringa*

«Tion ni volas diri: la paco estas ebla, se ĉiu el ni ĝin volas, se ĉiu el ni amas la pacon, edukas kaj formas sian pensmanieron al la paco, defendas la pacon, laboras por la paco. Ĉiu el ni devas aŭskulti en sia konscienco la devigan alvokon: la paco dependas ankaŭ de vi».

*Paŭlo VI*

# AVIZOJ

**1.**

Nia kongreso (20. VII vespere - 27.VII matene) okazos en Hamburgo, Jugendpark Hamburg - Langenhorn.

En via aliĝilo vi trovas la tutan sumon (kongreskontizon) por aliĝo, trankoj kaj manĝoj. Sendu la garantian sumon de 60 germ. markoj kun la aliĝilo. En la poŝtkonto ne forgesu meti la nomon de la kasistino (Helga Brodthage). LKK komunikas utilajn sciigojn: la ĉambroj situas en 4-5 domoj. Ekzistas tre malmultaj dulitaj ĉambroj, la aliaj estas 4-6-8-litaj kun fluanta varma kaj malvarma akvo. En ĉiu domo estas komuna salono por 40 personoj, krome ekzistas salonoj por 60 kaj 300 personoj (manĝosalonego). En la lasta ni povus komune sidi kaj ankaŭ fari prelegojn ktp. La junularparko estas atingebla per subtervagonaro (U-Bahn) ĝis Langenhorn-Markt, poste per la busoj 192, 193, 292, 392 ĝis 3-4 haltejo Krohnsstieg-angulo Wrangelkoppel. Poste sekvos aŭ piedirvojo dum 8-10 minutoj, aŭ veturo per taksio. Se la Loka Kongresa Komitato (LKK) scios la alveturdaton de grupo, ĝi povos organizi kaj lui buson inter U-Bahn-stacio Langenhorn-Markt kaj la junularhejmo. Aliaj avizoj pri tio estos publikigataj estonte.

**2.**

Por ne atentaj legantoj: por ŝanĝoj, korektoj de adresoj skribu al nia sekretario S-ro F. Galbusera (adreso sur la kovrilo), kiu havas la membroliston kaj prizorgas la elsendon de EK. Ne skribu al la presejo aŭ al la centra oficejo en Svislando!

La jarabonon por EK pagu al via landa reprezentanto, ne al la redakcio aŭ al la centra oficejo! Espereble ĉiuj jam pagis. Sendu raportojn kaj bultenojn al la Redaktoro!

**3.**

Kelkaj helpantoj petis nian sekretarion pri alia (dua) ekzemplero de EK, por sendi ĝin fermite en orientajn landojn (kiel leteron). Estus bone, ke aliaj petu du ekzemplerojn por tiu frata celo.

**4.**

En la januara numero (p. 174) ni publikigis regularon pri la elekto de la estraro.

*La Redakcio*

# E-KONGRESOJ 1974

La 58-a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Sheffield aprile.



La Kongreso de FKEA okazos en Les Ponts de Cé apud Angers (Francujo) de la 11-a ĝis la 12-a de majo.



La 6-a franca-hispana esperantista renkontiĝo okazos la 4-an kaj la 5-an de majo en Bayonne (Francujo).



La 34-a Hispana E-Kongreso okazos en Valladolid (18-22.VII).



La 26-a kongreso de IFEF (Internacia Fervojista E-Federacio) okazos en Tarragona de la 11-a ĝis la 17-a de majo.



La Kongreso de IKUE-KELI okazos en Hamburgo de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Aliĝu tuj!

---



De la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto okazos en Hamburgo (Germanujo) la Universala Kongreso de Esperanto sub la alta protektado de D-ro Klaus Dohnanyi, ministro pri Klerigo kaj Scienco.



En Münster (Germanujo) okazos la 30-a internacia Kongreso de la esperantista junularo (TEJO) de la 4-a ĝis la 10-a de aŭgusto.



La 15-a Eŭropa Ferio-semajno, organizita de Svisa Asocio de E-Fervojistoj, okazos de la 22-a ĝis la 28-a de septembro 1974 en Magliano, ĉe la bordo de la Lugano-lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano. Por informoj: Ernst Gättli - Laurstrasse 17 - CH Brugg - Svislando.

El «Informilo» de la ĉeĥoslovakaj IKUE-anoj ni ekscias, ke renkontiĝoj okazos printempe en okcidenta Bohemio, komence de julio en Opava kaj komence de oktobro en Česká Trebová.



La kataluna renkontiĝo okazos en Cervera septembre.



Kunveno de sacerdotoj okazos en Rimini (Italujo) de la 28.a ĝis la 30.a de aprilo 1974 organizita de U.E.C.I. Por informoj skribu al sekretario de UECI, Vicolo Ghiacciaia 6 - 37100 Verona (Italujo).



La 45-a itala Kongreso de Esperanto okazos en Verona de la 14-a ĝis la 20-a de septembro. En la kadro de la nacia kongreso okazos la kunveno de UECI, la itala filio de IKUE.

---

# EL LA MONDO ESPERANTISTA

*Hamburgo. Grupo da esperantistoj organizis tie ekspozicion por konigi Esperanton kaj la proksiman Universalan Kongreson. La ekspozicio daŭris 10 tagojn kaj vizitis ĝin ĉ. 265 mil personoj.*



*Filmo pri Zamenhof. En Pollando oni preparas televidan filmon pri Zamenhof kaj lia agado. Oni realigos ĝin pole kaj esperante por la printempo 1974.*



*Aŭstralio. La novelektita deputito Mackenzie en sia unua parolado substrekis la necesecon de Esperanto en internaciaj rilatoj.*



*La aŭstria radio dissendas programon en Esperanto ĉiun sabaton de 17,45 ĝis 17,55 h. (MET). Tiu dissendado (ondoj 6155 por Eŭropo) estas ripetata la sekvantan dimanĉon de 6,45 ĝis 6,55. La programon prizorgas la Radio-Servo de AEF.*

*Radio Roma. R.R. disaŭdigas esperantlingve programojn ĉiudimanĉe inter la 21 h. kaj 21,20 laŭ mezeŭropa tempo.*



*Feliĉa iniciato. Prof. Mariani, lernejestro en Cesena (Italio), enkondukis la instruon de Esperanto en sian elementan lernejon (tria, kvara kaj kvina klasoj) por helpi la studentojn de fremdaj lingvoj dum la superaj lernojaroj.*

*La gelernantoj gastigis pasintjare geknabojn el Zagrebo, Jugoslavio. Organizis ĉion la Internacia Kultura Servo de Zagrebo kune kun lernejo Oltresavio kaj Unuiĝo E. Romagna. Italujo partoprenas oficiale kvinlandan eksperimenton por elementaj lernejoj, kiu finiĝos en junio 1974.*



*Korano. La tradukinto de la Korano, d-ro Italo Chiussi, mortis antaŭ nelonge en Frankfurto (Germanujo).*



*Pola aviadilo. El Varsavio oni komunikis, ke unu el plej grandaj aviadiloj estos nomata Zamenhof. La «hostesses» de tiu aviadilo devos frekventi kurson de Esperanto.*



*Dum la memoro pri 70 jaroj de «Espero Katolika» s-ano W. Mudrak raportis kaj montris la unuan binditan jarkolekton de EK 1903, la saman ekzempleron, kiu estis en la manoj de Pio X-a, kiu benis nian organon kaj deziris al ĝi feliĉan estontecon.*



La direktoro de hotelo diras al kelnero:

- Kial vi disputas kun la kliento? Ĉu vi ne scias, ke la kliento ĉiam pravas?
- Sed la kliento diras, ke vi estas ŝtelisto.

Tre malfrue sonoras la telefono en la domo de la parokestro:

- Bonvolu sendi al mi tri batelojn da biero. Mi estas s-ino Rossi; ĉu mi parolas kun la centra trinkejo?
- Sed s-ino Rossi, mi estas la parokestro.
- Kion faras vi, sinjoro parokestro, en la vendejo meznokte?



---

# Pasporta servo

72, rue de Rennes, F-75006 PARIS, Francio


---

PASPORTA SERVO estas la gastiga servo de TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO.

Multaj homoj el ĉiuj aĝoj havas loĝejon iomete pli grandan ol sufiĉas por ili, kaj ŝatas ekhavi novajn amikojn kaj helpi al homfratoj. Multaj aliaj homoj — kuti me junaj — ŝatas vojaĝi, deziras konatiĝi kun enloĝantoj de vizitataj regionoj, kaj disponas pri malmulta mono. Se tiuj homoj hazarde parolas saman lingvon — ekz. esperanton — tre facile povas okazi gastigo kiu kontentigos ambaŭ.

Por faciligi tiajn gastigojn PASPORTA SERVO de TEJO estas reorganizita sur jenaj bazoj:

1. Pasporta servo estas neprofitcela servo disponigita al tiuj, kiuj pagas aliĝkotizon tiucele.
2. Kvankam ĝi funkcias en kadro de TEJO la servo devas esti finance memstara.
3. La servo publikigas ĉiujare *broŝuron* kiu enhavas listojn de gastigant-adresoj. La broŝuro estas disdonita kontraŭ aliĝpago.
4. La gastigofertoj registritaj laŭ geografia ordo en la broŝuro devas enteni jenajn informojn:
  - kio disponeblas: lito aŭ ĉambro
  - nomo kaj adreso kompletaj (kun mencio pri kiom for de la plej proksima granda urbo)
  - maksimuma periodo de gastado
  - maksimuma nombro de samtempaj gastoj
  - postulata aĝlimo de gastoj (eventuale)
  - periodo kiam la oferto validas.
5. La gastigpetanto mem ekkontaktas la koncernan personon ĉe kiu li ŝatus gasti kaj faras kun li la necesajn interkonsentojn pri la karakterizo de la gastado (daŭro, komforto, eventualaj repagoj por manĝoj, ktp.).
6. La servo ne povas respondi pri:
  - a) eventuala nekoincido inter la publikigitaj informoj kaj la efektiva plenumo de la gastado;
  - b) problemoj okazantaj se la gastigpetanto alvenas surloke sen antaŭe kontakti la ofertanton, aŭ antaŭ ol ricevi de la ofertanto konfirman respondon pri la gastigo.



## DAŬRIGO DE LA LETERO DE P. CICCANTI

Ĉu vi rimarkis? Mi neniun menciis aparte ĉar la listo fariĝus tro longa, sed ĉiujn mi perfekte memoras kaj dankas tutkore pro la varma akcepto, malavara gastigado, sindonemo, helpemo.

Ne forgesbla la ĝentila sinteno de kelkaj karaj «patrinoj» tiel zorgemaj ĝis: «jen, io por manĝi survoje»!... Ankaŭ frapis min la invitoj pri mia reveno kaj revizito, eble kun pli riĉa programo dum pli longa restado, kaj la pardonpetoj pro neeviteblaj mankoj...

Sed, karaj geSamideanoj, kvankam oni povas ĉiam pli perfekte aranĝi prelegvojaĝon, mi tamen sincere diras al vi, ke neniam dum miaj multaj vojaĝoj oni tiel bone aranĝis ĉion ĝis detaloj kiel en Skandinavio. Precipe mi sentas la devon danki pro la akurata «unua akcepto» ĉe stacidomoj, ŝip- kaj flughavenoj, malgraŭ kelkfoje la noktaj aŭ frumatenaĵoj de mia alveno aŭ forveturo.

Ĉu vere Esperantistoj ĉiuj konas min? La plejparto jes, aŭ per antaŭa persona renkontiĝo aŭ per fotoj, raportoj, diapozitivoj, filmetoj, k.s. Sed nur malmultaj el ili konas mian laboron tra la mondo por atingi la «neesperantistan publikon». Kion fari?

Kelkaj proponis, ke mi sendu longan raporton kun fotoj pri mia aktiveco al E-gazetoj por tiel stimuli Esperantistojn pli efike kaj sukcese utiligi mian ĉeeston dum miaj vojaĝoj. (Tion faru prefere la landaj aŭ lokaj E-organizoj kiuj invitis min). Aliaj konsilis pretigi prospekton pri mi kiel franciskana pastro esperantista, kun aldonita folio en nacia lingvo. Prospekto disdonenda okaze de miaj vojaĝoj kaj helpe de Esperantistoj. Ĵurnalisto, post longa konversacio, preskaŭ ŝokita pri la graveco de mia laboro, pri la noblaj kaj netakseblaj avantaĝoj de «esperanto» kiel dua komuna lingvo, la plej taŭga solvo de la monda lingvo-problemo, diris, ke oni devus proponi min «kandidato» por la «nobel»-pacpremio! (Oni devus nur esplori, ĉu de tio vere sekvus interesiĝo de la tutmonda gazetaro). Jen mia rimarko. Mi opinias, ke la voj' elektita, laŭ kiu mi jam de longe marŝas, estas unu el la plej efikaj kaj subtenindaj informrimedoj por Esperanto. (Eble pro tio oni ĉiam pli ofte invitas min por viziti en diversaj partoj de la mondo). Unue, mi precipe kaj prefere uzas la internacian lingvon rekte aŭ pere de interpretisto. Due, ĉe lernejoj, gastlaboristoj, skoltoj, kulturaj kaj religiaj grupoj mi kutime bone sukcesas. La prelego estas ĉiam elasta laŭ la postulo de la publiko kaj cirkonstancoj: tempo, aĝo, kulturenivelo. Multfoje mi variigas la prelegon per paŭzo ĉe la piano, aŭ per diapozitivoj kiel rapida ekskurso al iu interesa itala urbo. Anstataŭ prelegi pri fiksita temo, eĉ okazas, ke oni invitas min paroli libere pri mia «misio» tra la mondo, pri vojaĝoj, spertoj... kaj pri la lingva problemo mem. Do, mi marŝas sur vojo -klara kaj rekta kaj tre difinita.

Jes, -mi parolas la lingvon de mia publiko- multfoje mi ripetas al ĵurnalistoj — ĉar mi ofte prelegas ĉe kluboj kaj okaze de kongresoj, kunvenoj, esperanto-tagoj mi celebras Meson, predikas, konfesprenas en esperanto... Sed mi tute ne limigas min al Esperantistoj.

Mi sentas, ke la «neesperantista publiko», precipe la junularo, rajtas esti informata pri nia «privilegio», pri nia «mirinda solvo»; ke ni devas klopodi por respondi al tia postulo; ke tion oni povas atingi per relative simplaj kaj malmultekostaj rimedoj... Ĝuste, do, kiel ni ĵus faris dum mia prelegvojaĝo tra Skandinavio, kie mi parolis al miloj da personoj rekte kaj al aliaj miloj pere de kvindeko da intervjuoj: ĵurnaloj, revuoj, radiostacioj. (Por atingi televidon oni preskaŭ nenion faris, bedaŭrinde!). Oni ofte prezentis min per trafaj titoloj kaj subtitoloj, kun pli malpli grandaj fotoj, kiuj, ankaŭ pro la franciskana uniformo, plej efike altiras la atenton de la legantoj.

Do, karaj geSamideanoj kaj geAmikoj en Norvegujo, Svedujo Finnlando kaj Danlando: multajn gratulojn pro via laboro por Esperanto. En Skandinavio mi renkontis valorajn talentojn, aktivulojn imitindajn. Laŭ mi, malgraŭ la nuna invado de la angla lingvo, Skandinavio estas hodiaŭ en la plej taŭgaj kondiĉoj por subteni kaj oficialigi nian proponon. (Kompreneble, ne sendepende de la centra Eŭropo). Pro tio, oni nepre devus aranĝi laborkunvenojn (sufiĉus 15 aŭ 20 personoj) por serĉi kaj elekti la plej ĝustan vojon al la celo, por kunigi antaŭ ĉio la fortojn, por pretigi oficialan petskribon rilate ekz. la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, por pripensi novajn, pli aktualajn informrimedojn. Kvankam kelkaj Esperantistoj fieras pri la bulteno aŭ organo de la landa E-asocio, oni prikonsideru ekz. ĉu ne estus pli avantaĝe informi per simplaj cirkuleroj kaj subteni la jam ekzistantajn internaciajn E-gazetojn. La skandinavaj landoj, laŭ mia opinio, estas nun en tia situacio, ke per kunagado ĝis titolita papero (ekz. skandinava organizo por esperanto) povas multon atingi. Mi, kiu rigardas de supre kaj senpasie-senpartie juĝas, estas preta kunlabori kun vi por ĉiam pli efike kaj rapide antaŭenpuŝi nian movadon. «Obstine antaŭen! La nepoj nin benos».

Sincere kaj amike,  
p. Albino Ciccanti  
Vc. S. Bernardino, 26  
47037 RIMINI (Italujo)

Rimino, la 30an de novembro 1973

---

N.B. Okazis ofte, ke tuj post la intervjuoj mi forveturis al alia urbo kaj ne povis kontroli pri la rezulto... Kelkajn ĵurnalojn mi tamen ricevis tuj aŭ survoje, aliajn oni sendis al Rimini (dankon), sed certe kelkaj ankoraŭ mankas.

Do, se iu el vi scias, ke intervjuo aperis kaj oni ne sendis ekzempleron al mi, *bonvolu, mi petas, sendi por mia albumo* (prefere la originalon: titolpaĝon kaj la paĝon de la intervjuo). Izolitaj intervjuoj ne tiel valoras kaj efike impresas kiel male kunligitaj en granda kolekto.

---



## LEGANTOJ SKRIBAS

WALTER MUDRAK (AŬSTRIO):

La temo pri la 7-a tutmonda porpaca tago 1974 estis: «La paco dependas ankaŭ de vi». Permesu, ke mi en tiu konekso ion proponu: Ni katolikaj esperantistoj vidu specialan instigon kaj inviton doni nian kontribuon laŭ tiu temo. Ĝuste Esperanto, nia neŭtrala lingvo internacia, servu, helpu al la porpaca celado! Tio ankaŭ korespondu al nia firma kaj intima ligiteco kun la S. Patro Paŭlo VI-a, kiu, malgraŭ multaj deklaroj kaj proklamoj de fideleco fare de katolikaj rondoj, organizoj kaj anaroj, staras sufiĉe forlasita, sola kaj ne atingas sufiĉan subtenon ĝuste de ofte sin nomantaj specialaj fideluloj liaj.

Estus ankaŭ grandega afero iel interesigi la Papan Komisionon «Justitia et Pax» pri Esperanto, nia porpaca lingvo. Al tiu papa Komisiono ni devus proponi niajn servojn kaj kunlaboradon. La paco dependas ankaŭ de vi, katolika esperantisto!

ASOCIO «GEAMIKOJ DE L'GERANIO» (Palermo, Italujo):

Nia asocio, kiu estas sendependa institucio por la libertempo kaj la ras-fratigo, konsistas en reciproka agado pri spirita helpo, teknika helpo kaj disvastigado. Spirita helpo: ĉiutage dekoj kaj dekoj da geamikoj serĉas unu la alian, renkontiĝas, konfidas unu al la alia siajn zorgojn, problemojn, balbonaĵojn kaj ĉiam ricevas konsilojn tute sincerajn kaj fratajn. Teknika helpo: koncerne la kultivado de geranioj ni respondas ĉiujn demandojn kaj laŭkaze ni rekte adresas al florkulturistoj kaj spertuloj; ili respondas sen profita celo. Disvastigado: en la sulko de nia asocio ekestis en la Eksterlando la «British and European Geranium Society», la Geranium Gazette; en Anglujo kaj Aŭstralio la «Geranium and Pelargonium Society». Petu informojn de nia ĝenerala Prezidanto Pietro Conti Tarantino, Via Napoli 78, 90133, Palermo (Italujo).



---

# KATOLIKA HORIZONTO

---

KARD. MINDSZENTY

La Papo, konsiderinte la religiajn problemojn de la hungara ĉefdiocezo Esztergom kaj post intensa letera interŝanĝo kun la Primaso, je la fino de januaro deklaris vakanta tiun metropolitan diocezon kaj nomis apostola administranto «ad nutum Sanctae Sedis» (sub la senpera dependo de la Sankta Sidejo) Mons. Laslo Lekai, apostolan administranton de la vakanta diocezo Veszprem. La granda ĉefdiocezo jam de 25 jaroj estis regata nur nominale de Kard. Mindszenty, kaj tial ĝi bezonis efektivan kaj aktivan gvidanton. Samtempe estis publikigita letero, en kiu la Papo esprimas sian amon kaj sian estimon por Kard. Mindszenty, memoras liajn suferojn, kiuj vekis la surprizon kaj la intereson de la tuta mondo, liajn grandajn meritojn kaj virtojn. Kard. Mindszenty, kiu jam ekde 4 jaroj vivas en Vieno, estas 82 jara.

## MONS. CASAROLI EN POLUJO

Mons. Agostino Casaroli, sekretario de la Konsilio por la publikaj aferoj de la romkatolika Eklezio, en februaro vizitis oficiale la polan respublikon laŭ la invito de la pola registaro. Li daŭrigis tiel la dialogon komecitan en Vatikano novembre kun la pola ministro por la eksterlandaj aferoj. Je la fino de sia vizito li celebris solenan Meson en la katedralo de Varsovio, kiun ĉeestis la pola Primaso, Kard. Stefano Vyszinski. En siaj deklaroj Mons. Casaroli parolis pri la kora akcepto en Polujo kaj diris, ke oni faris kontentigan antaŭenpaŝon, kvankam la problemoj ne estas solvitaj.

\* \* \*

## MESO POR INFANOJ

Grava eklezia dokumento estis difinita la «Direktivaro por la meso kun partopreno de infanoj», disvastigita ekde la 20-a de decembro pere de la Kongregacio por la Dia Kulto.

\* \* \*

## PONTIFIKA JARLIBRO

En januaro aperis la «Pontifika Jarlibro 1974». El supraĵa rigardo rezultas jenaj indikoj: 135 membroj de la Sankta Kolegio; 2198 rezidaj episkopaj sidejoj kaj 1983 titolaj; 102 Prelatuoj, 22 Abatejoj «nullius»; 11 Apostolaj Administracioj, 84 Vikariejoj; 67 Prefektuoj; 26 militistaj Vikariejoj kaj 97 Episkopaj Konferencoj. Inter la aliaj indikoj: 47 katolikaj universitatoj, 23 fakultatoj por ekleziaj studoj kaj 32 fakultatoj apud ŝtataj universitatoj.


---

D-ro Brown diras al amiko:

— La virino, kiu nun preteriras, estas la virino, kiun mi amas.

— Kial vi ne edziĝas kun ŝi?

— Tion mi ne povas al mi permesi: ŝi estas mia plej utila klientino.



# Ni funebras

La 24-an de novembro 1973 mortis S-ano Raimund Cech (Vieno), honorprezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio (AEF), kies faka grupo estas Aŭstria Katolika Ligo Esperantista (AKLE). Cech estis fidela membro de AKLE kaj plurfoje prezidanto de AEF, dum pli ol 60 jaroj aktiva esperantisto.

(W. Mudrak)



Alia grava perdo estas la morto de Luigi Minnaja en Romo la 27-an de januaro. En 1926 li frekventis kurson en la Roma Popola Universitato. Ek de tiam, praktike neniu agado poresperanta en la ĉefurbo restis sen lia entuziasma kaj efika kunlaboro. Dum la 27-a UK, kiu okazis en Romo en 1935-a, li estis ĝenerala sekretario kaj prilaboris kun sia edzino Carolina la tradukon en Esperanton de la turisma gvidlibro «Romo kaj ĉirkaŭaĵoj». Lia nomo estas nedisigeble ligita al la E-dissendoj de Radio Roma. Li verkis plurajn originalajn kaj tradukajn literaturaĵojn, el kiuj multaj aperis en la gazetaro aŭ en libroj, kaj kelkaj gajnis premiojn en konkursoj. Ni publikigas du poemetojn, kiuj aperis en «Katolika Sento». Li ankaŭ esperantigis multajn italajn kanzonojn, dissenditajn per radio.

Fervore li ankaŭ kunlaboris en la katolika movado per tradukoj de papaj mesaĝoj kaj de religiaj sciigoj, kiuj regule aperis en KS. Li estis dum preskaŭ 3 jardekoj delegito de UEA kaj dum 12 jaroj estrarano de Itala E-Federacio. La Roma Grupo organizis esperantlingvan funebran diservon, kvazaŭ por daŭrigi la ĉiudimanĉan celebradon, kiun li kutimis partopreni.

(El raporto de P. G. Jacobitti)

## PACON, SINJORO!

*Pacon, Sinjoro, donu al niaj tagoj  
persiste turmentataj de l' ĉagreno:  
naskiĝu la estimo en la agoj,  
rebrilu en la mondo la sereno!*

*Pacon, Sinjoro, donu al l'animoj  
premataj de senĉesa maltrankvilo:  
el ĉiu koro flugu for la timoj  
kaj la dolor'! Ridetu la pupilo!*

*Pacon, Sinjoro, al la familioj  
time vivantaj sub detruminaco:*

*ilin streĉ-ligu amaj energioj,  
ilin protektu daŭra dia graco!*

*Pacon, Sinjoro, al la patrolando!  
En ĝi prospero regu kaj konkordo,  
kunagu ĉiu fil' por ĝia granda  
per progresad' konstanta en la ordo.*

*Pacon, Sinjoro, inter la nacioj  
sin rigardantaj kun suspekta koro:  
celante al tutmondaj harmonioj  
fratiĝu la homar'! Pacon, Sinjoro!*

L. Minnaja

## ERMITEJAJ SONORILOJ

*Sur monto kuŝas pia ermitejo.  
Sub la devizo «Preĝo kaj laboro»  
ligas Kamaldulanojn al obeo  
sankta fervoro.*

*Ĝuas l'ermitejoj en l'intima nesto  
ĉe l' propra eta ĉelo, en izolo,  
la varman meditado pri l' majesto  
de l' Di-parolo.*

*Ĉe ili staras ĉarma preĝejeto.  
Je l'Anĝeluso tra l' silento fora*

*el kampanil' descendas kun kvieto  
l'ondo sonora.*

*Ĝi estas sono sereneco-plena,  
de l' najbar' iĝinta jam amika,  
tra la deklivo ĝis la val' ebena  
voĉo mistika.*

*Mistika voĉo al la preĝ' invita;  
en la soleco pura, pacanĝelo;  
amo-kantiko supren direktita  
al la ĉielo.*

L. Minnaja



## APOZICIO

La apozicio estas substantivo, kiu plenumas la funkcion de komplemento de alia substantivo antaŭmetita kaj en rilato kun ĝi per senpera apudesto.

Ekz. - Sinjoro Vilhelmo Marconi, doktoro Zamenhof, profesoro Benot, la fama filozofa Sokrato, la muzeo Leonardo, la restoracio Kairo, la urbo Romo, la insulo Islando, la maro Mediteraneo...

\* \* \*

Neniam apozicio prenas la -n finaĵan, eĉ kiam la vorto determinata, kies komplemento ĝi estas, sidas en akuzativo.

Ekz. - Goeto vizitis la eternan urbon Romo en 1786. En la 8-a jarcento oni malkovris la insulon Islando. Ĉiuj devas lerni la neŭtralan lingvon Esperanto. La admirantoj vizitis s-ron Vilhelmo Marconi.



# *Prelego de d-ro Bormann*

Enhavo de prelego de Dr. Werner Bormann, estrarano de UEA por landaj kaj fakaj asocioj, pri la temo: Kion povas fari fakaj asocioj por Esperanto? dum la jarĉefkunveno de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, la 6-an de oktobro 1973 en Bielefeld.

Pro sia amaso da Esperanto-rilatoj la federacia registaro de Germanio ĉi-somere decidis pri afergvidanta ministerio: ĝi fariĝis tiu por edukado kaj scienco. Delegacio de la estraro de GEA vizitis antaŭ du semajnoj en Bonn «niajn» oficistojn, kiuj prilaboras Esperanto-aferojn. Ili vidas ŝancojn de plivastiĝo por Esperanto preskaŭ nur en la lernejoj konsiderante la malemon de plenkreskuloj lernadi. Sed «Esperanto en la lernejoj» nuntempo povas signifi nur kiel unu inter pluraj lingvoj, ne Esperanto anstataŭ alia, ekz. la nun ofte kutima angla. Por tio eĉ ekzistas nun favoraj cirkonstancoj pro la kurssistemo en la lernejoj kaj la bonvena oferto de Esperanto kiel facila lingvo. Tiun ŝanc-egaligan efikon de Esperanto ja ankaŭ elstarigis pasintjare dum la 50-a Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig la festparolanto prof. Dr. Rupprecht, departementestro pri lernejoj en kulturministerio.

Tre verŝajne niaj klopodoj ne realiĝos en baldaŭa estonteco. Al «Esperanto la dua lingvo por ĉiuj» antaŭiras periodo de Esperanto kiel unu solvo inter pluraj - io kutima por nia plurisma epoko. Tio refoje klariĝis al nia GEA-delegacio dum samtaga aŭdienco ĉe la prezidento de la Federacia Respubliko Dr. Heinemann. Li interesoplene informiĝis pri Esperanto kaj ĝia movado, sed lia opinio pri la vastkonata angla ne estis rapide ŝancelebla. Imponas nur niaj efektivaj faroj. Ilia centra pozicio en nia argumentado ja estis ankaŭ substrekita en la salutmesaĝo de prezidento Tito legita dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Beograd, kaj prezidento Jonas dum la kongreso en Vieno same konsilis al ni, mem doni al Esperanto unue pli vastan fonon prepare al sukceso.

Prezidento Dr. Heinemann demandis, kio estus la decida breĉobato por Esperanto nuntempe. Mi respondis (sub la impreso de la prezidenta favoro por la angla): ke Esperanto estu vere agnoskita kiel unu el la eblaj solvoj por la mondlingva problemo. Tia agnosko kutime venas de la scienco, kaj tial esploradoj pri «la kondiĉoj sociologiaj, kulturaj kaj lingvistikaj de komuna norma lingvo uzota en la internaciaj rilatoj (PIV-difino por interlingvistiko) estas urĝe bezonataj. Tion mi jam postulis en mia festprelego «Esperanto en la lernejoj» dum la 42-a Germana Esperanto-Kongreso en Soltau 1964. Sed tio estas nur unu flanko de la medalo, la teorio. Se io serĉas agnoskon, sampeze gravas la praktiko, la apliko de la Internacia Lingvo por iu senca afero. Uzi Esperanton praktike signifas pli facilan elvolviĝon de io utila, kaj utileco alte valoras en nia materialisma tempo.

Jen estas la vasta kampo de la fakaj asocioj en la Esperanto-movado. Tie ili labo-

radas, kaj el tio konsekvencas ilia kontribuo por nia celo. La demando metita al mi en la tempo de mia prelego: «Kiom povas fari fakaj asocioj por Esperanto?» estas resume respondebla tiel: aktivi kaj per tio decide kunhelpi en la breĉobato favore por Esperanto. Per fakaj laboroj ili pruvas, ke Esperanto kapablas servi sur ĝenerale rekonitaj kampoj, kaj ĝi tiel povas enviciĝi inter la socie akceptitaj instrumentoj.

Tiun apogan rolon ludas ambaŭ tipoj de fakaj asocioj. Profesia uzo de Esperanto facile vekas atenton ekster niaj rondoj. Esperantistoj formas diversspecajn grupojn de samprofesiuloj. Modelo por unu estas la instruistoj, multaj el ili scipovantaj fremdlingvojn. Ilia esperantistiĝo estas signo de seniluziĝo majstri la lingvajn barojn per naciaj lingvoj lernataj kiel fremdlingvoj. La alia ekzemplo estas la fervojistoj, kie multaj homoj, inter ili parto ne lerninta fremdlingvon en la lernejo, havas densajn translimajn kontaktojn. La duan tipon de fakaj asocioj konsistigas la organizaĵoj ne ligitaj al okupo, sed al iu aparta intereso, nomebla «fako». Kelkaj el ili jam faras konsiderindan laboron en sia fako kaj simple per tio por Esperanto. Ankaŭ malamiko de Esperanto ne povas subpremi la valoron de servoj en la aŭtohelpado per nia aŭtoklubo IEKA, pri kiu mi scias kiel ĝia vicprezidanto. Grandan aprezon ankaŭ atingis niaj religiaj asocioj. Ĵus fondita estis mondasocio por turismo, en kiu kampo la plej grandaj praktikaj sukcesoj de Esperanto estas facile imageblaj. Kiel estrarano de UEA komisiita zorgi pri la fakaj asocioj mi devas fine montri la taskojn de UEA rilate fakajn asociojn. Nia mondorganizaĵo ja havas du bazajn funkciojn: la tegmentan kaj la memfaran funkciojn. Ĝi mem prilaboras la delegitan reton, la kontaktojn al mondorganizaĵoj kiel UN kaj UNESKO, la revuon «esperanto» kaj la Universalajn Kongresojn. Sed kiel ĝenerala centro de la Esperantomovado ĝi devas doni la gvidlinion por la aganta esperantistaro kaj fiksi la «Esperanto-politikon», t.e. nian vojon por plejeble rapide sukcesigi la Internacian Lingvon. Pro tiu tasko ĝi klopodas kunordigi ankaŭ la laborojn, kiujn la fakaj asocioj entreprenas el siaj fakspertoj, kaj tial mi daŭre serĉas la kontakton kun la fakaj asocioj. La tegmenta funkcio due signifas, ke UEA devas mem aktivi tie, kie rekte koncernataj fortoj ankoraŭ mankas aŭ estas malfortaj. Mi strebas plimalgrandigi tiun parton el mia estrara ofico por vekti pli kaj pli da Esperanto-aktivecoj ĉefe en fakaj medioj.

S-ino Miller aŭdas bruegon en la kuirejo.

— Anna, ĉu vi rompis ion denove?

— Jes, sed ĉifoje mi havis bonan ŝancon: la glasoj ne estis lavitaj.

Almozulo, etendante manon, diras:

— Mi perdis gambon, sinjoro...

— Mi multe bedaŭras, sed mi ne trovis ĝin.

# landaj reprezentantoj

---

## Anglujo

S-ro N. W. Vigar,  
28 Franklands Drive,  
Addlestone - Surrey

## Aŭstralio

S-ro V. J. Timmins,  
73 Alexandria Parade,  
Hornsby N. S. W.

## Aŭstrujo

S-ro W. Mudrak,  
Beatrixgasse 19/9,  
A-1030 Vien III, P. K. 105.713.

## Belgujo

Lange S-ro ~~EX WYWX~~ Eugene Paesmans,  
L. Koepoortstraat 64, B. 2000  
Antwerpen, Telef. 321751 P. K. 41 45 89

## Brazilo

B. E. L. Praça da Republica 54, 1 E.  
Rio De Janeiro

## Ĉeĥoslovakio

75501 S-ro Ales Berka,  
Na Harazi 1423, Vsetin

## Francujo

S-ro Gaston Veron,  
Place de la Petite Bruyère,  
Donfront (Orne) F. 61700  
P. K.: G. Véron  
CCP Rouen 1188-63 Z

## Germanujo

S-ro Gerhard Vogel  
Tondernstrasse 36, D-5 Köln 30  
P. K. Köln 166355

## Hispanujo

3 a S-ro Miguel Martinez,  
Av.da San José 105,  
Pral. Zaragoza

## Irlando

S-ro J. O' Reilly,  
« Woodbine », Bluebell,  
Dublin 12

## Italujo

S-ro C. C. Ferrari,  
Viale dei Mille 37,  
I-20129 Milano Telef. 267.895,  
P. K. 3-7791

## Japanujo

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)  
596 Oosaka-HU Kisiwada-si  
Namimatu-Tyô, 4 ban, 5 gô

## Jugoslavio

~~KWFXVBYXW,YX~~ Ferenc Dongo  
~~Hadi Melentija 75~~ JU-24413 Palić  
~~YU, 1100, Beograd~~ Javorska ul. 4  
~~XWYXXWYX~~

## Kanado

S-ino Pauline Proulx,  
790-80 E Rue Est,  
Charlesbourg, Québec 7

## Kolombio

P. Louis E. Palacios Toral,  
Apartado Aéreo 12-03,  
Cartagena

## Koreo

S-ro Paul Kiseng Kim,  
I. P. O. Box 2752,  
Seoul (South Korea)

## Madagaskaro

S-ro Ramanantsoa Claude  
Dominique Gérard  
Cité Ambohipo 469  
Tananarive

## Nederlando

S-ro S. P. Smits;  
~~Stadhoudersring 326~~ Stadhoudersring 326  
~~Zoetermeer~~ Zoetermeer  
~~KFFWWXPKXW~~ P.K. 68 51 24

## Nov-Zelando

D-ro Hamway Johano,  
29 Arran str. Avondale X,  
7Auckland SW. 3

## Polujo

Pola Katolica  
Unuiĝo Esperantista,  
41800 Zabrze, ~~SKWBY~~ 1 Skt. PT. 68

## Portugalujo

S-ro M. M. Lourenço Gouveio,  
Caixa Postal 456,  
Funchal-Madeira

## Svislando

S-ro Lutz-Parolo Johann  
Himmelrichstr. 61  
CH 6010 Kriens (LU) P.K. 60-1759

## Urugvajo

D-ro R. Zeballos Morales,  
Fray Marcos (Flor)

## Usono

S-ro H. S. Corlett,  
7605 Winona Lane,  
Sebastopol, California 95472



---

Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

---

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando  
Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

---

Presejo: SCUOLA GRAFICA — Istituto Salesiano S. Zeno - v. Minzoni 50 — 37100 Verona

---

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70